SES-bulteno

beta, 27.6.2008

Detalaj informoj por aliĝintoj al **Somera Esperanto-Studado** 2008, Modra-Harmónia, Slovakio:

Rim.: bv. plusendi tiun ĉi mesaĝon al koncernuloj, se ili aliĝis per via ret-adreso, ev. sciigu ilin pri la enhavo de ĝi.

Pagoj:
Bv. memori, ke via aliĝo estos valida nur post la ricevo de antaŭpago por la aranĝo – pago de aliĝkotizo! - sen tiu ni ne povas garantii rezervon de tranoktoj, manĝoj kaj aldonaj servoj (vi povas pagi antaŭe ankaŭ la tutan sumon necesan). En la kazo, ke vi mem ankoraŭ ne pagis la aliĝkotizon, faru tion laŭeble frue. (ne validas por stipendiitaj lernu-helpantoj)

Vizoj:
Al ĉiuj, kiuj sendis la antaŭpagon kaj notis ke bezonas vizon, estis senditaj invit-leteroj por SES. Se vi do ne ricevis invitilon, povus esti ke vi ne pagis la necesan sumon por ĝi, aŭ – kaze ke vi pagis, eble okazis iu problemo pri livero – en tiu kazo bv. kontakti nin pri la afero ĉe: peter.balaz@ikso.net .

Mono:
En Slovakio validas la valuto „Slovaka krono“ mallonge Sk aŭ SKK. Gia valoro: 1 EUR = ĉ. 30 SKK. En kelkaj lokoj kaj vendejoj (ekz. magazenoj „Tesco“) eblas tamen pagi ankaŭ en eŭroj. La aranĝon SES eblos pagi surloke ankaŭ per eŭroj aŭ slovakaj kronoj (ni ne akceptas dolarojn aŭ britajn pundojn). Dum la aranĝo eblos aĉetadi ekz. en bufedo aŭ libroservo kontraŭ kronoj aŭ eŭroj.

Alveno/foriro:
La aranĝo komenciĝas la 9an de aŭgusto posttagmeze (alvenado ekde 12:00 horo), finiĝas la 17an posttagmeze - je 14:00 horo. Bezonkaze eblas veni 1 nokton pli frue, kaj ev. resti kelkajn noktojn post la aranĝo, kontraŭ kroma pago (tiuj tranoktoj kostas 15 EUR/nokto/persono) – pri via bezono por kromaj noktoj vi nepre informu nin antaŭ la 1a de aŭgusto, por povi rezervi lokojn.

SES-ejo:
En SES-ejo estos je dispono eta bufedo kaj libroservo dum tuta semajno – eblos pagi en eŭroj aŭ slovakaj kronoj en ili.
En tuta teretaĝo estos senpage uzebla sendrata retkonekto – vi do povas porti vian porteblan komputilon, se vi volas.
En la konstruaĵo de SES estas malpermesita fumado – bv. respekti tion kaj laŭbezone fumi nur ekster ĝi.

Manĝoj:
Manĝado okazos en la manĝejo de SES-ejo mem (laŭ tempoj indikitaj en program-tabelo).
Ĉiuj, kiuj ne mendis manĝojn devus prizorgi manĝadon mem – je dispono en SES-ejo estos nur eta bufedo kun trinkaĵoj, keksoj... Se vi hazarde volus al-mendi la manĝojn, bv. skribi al peter.balaz@ikso.net pri tio. Dum la aranĝo eblos ankaŭ al-mendi manĝojn por sekvaj tagoj, kaze de bezono/deziro (minimume 2 tagojn antaŭe).

Dormado:
Dormado okazos en du lokoj – SES-ejo kaj apuda medicina student-hejmo. Unuaj 85 aliĝintoj dormos en SES-ejo, ceteraj en proksima, nur 30-metrojn fora studenta hejmo. En SES-ejo ĉiu ĉambro havas propran duŝejon kun necesejo. Vi ricevas littukojn kaj vizaĝtukon, bv. Kunporti bantukon kun vi.

Vojaĝo:
Ĉe jena paĝo vi trovos detalan itineron, klarigojn pri atingo de SES-ejo:
http://www.esperanto.sk/ses2008_konektoj/
Se vi tamen bezonus iun aldonan informon, konsilon, bv. skribi pri tio al: peter.balaz@ikso.net

Instruado:
Instruado okazos en 4 grupoj – laŭ la nivelo de via lingvo-scio - ĉiam antaŭtagmeze. Dum la alvena tago – sabate posttagmeze okazos mallonga testado – por ke instruistoj povu disdividi vin al grupoj laŭ viaj lingvo-scioj. Nepre ĉeestu ĝin.

Programo:
En aparta dokumento vi trovos provizoran program-tabelon por SES – ĝi ne estas kompleta, pluraj aferoj aldoniĝos al la programo dum sekvaj semajnoj. Same povas ev. ŝanĝiĝi iom tempoj de unuopaj prelegoj, prezentoj.
Rim.: Dum la ekskursaj tagoj estos preparita aparta programo por tiuj, kiuj ne ekskursos – prelegoj, manlaboroj... (informoj pri ĝi aperos iom pli poste). Aldone eblos pasigi liberan tempon per „aldona“ programo – kiu ne estas oficiale organizata de SES-teamo (naĝado en lago, naĝejo, „Paintball“, promenado tra arbaroj, …)

lernu.net -programo:
Dum la aranĝo okazos specialaj programoj, dediĉitaj al la projekto www.lernu.net **– gvidataj rekte de la lernu-teamanoj. Ni elkore bonvenigas ĉiujn partopreni – kaj tiel lerni pli bone uzi la paĝaron, ev. helpi plibonigi ĝin.**
Ekzistos tri kategorioj de lernu!-programeroj:
- por simplaj uzantoj, kiuj volas povi uzi la paĝaron pli bone,
- por jamaj aktivaj helpantoj
- por eventualaj estontaj helpantoj.

- Prelego por simplaj uzantoj pri kiel uzi la paĝaron: registriĝo, diversaj partoj de lernu!, ...
- Tradukado kaj vortarredaktado
- Lingvohelpado - ĝenerala lingvohelpado kaj gvidado de virtualaj lecionoj.
- Tekniko malantaŭ la paĝaro – prezento de kelkaj ĉefaj moduloj de lernu!
- Uzino pri pli efika uzado kaj kiel plibonigi lernu! (por tiuj, kiuj jam scipovas uzi la paĝaron)
- Uzino pri la estonto de lernu!

Via kontribuo:
Vi mem povas ankaŭ kontribui al la programo de SES – vi povas proponi ion interesan, kion ni povus enmeti en la oficialan programon (kantado, prelego, instruado de via lingvo...). Por via kontribuo eblas ricevi rabaton de pago – tiu dependos de la kontribuo, ĝia daŭro...
Via kontribuo estos ankaŭ bonvena dum la internacia vespero – se vi pretas prezenti vian landon, kulturon, lingvon per ia artaĵo (kanto, spektaklo, muziko, …) - nepre pripensu kontribui.

Aldona /libera/ programo:
Krom oficialaj programeroj vi havas liberan elekton por propra, privata pasigo de tempo – estas pluraj eblecoj en proksimeco:
- baseno (pagenda, 1horo por lui kostas 800,- SKK/27 EUR – por ajna kvanto da homoj)
- naĝejo publika en Modra (3km de SES-ejo, eniro ĉ. 2 EUR)
- paintball (ludebla proksime – 300 metrojn de SES-ejo)
- promenoj tra arbaroj (rekomendindas ekskurso al „Zochova chata“)
- masaĝoj (mendeblas rekte en SES-ejo)
- ...

Anĝeloj:
Dum la aranĝo zorgos t.n. a**nĝeloj** pri „novuloj“ = tiuj, kiuj ne ĉeestis ĝis nun internacian Esperanto-aranĝon. Tiuj homoj povas helpi al tiuj, kiuj estas novuloj pli bone orientiĝi, konsili programerojn, klarigi aferojn, priparoli problemojn... Kun anĝeloj vi havos eblon pli bone konatiĝi dum la sabata „Interkona vespero“. Anĝeloj estas kutime spertaj esperantistoj, kiuj bone konas similajn aranĝojn kaj povas esti utilaj al novuloj.

Ekskursoj:
Dum SES okazos 3 duon-tagaj kaj 1 tut-taga ekskurso.
Ilia divido estas jena:
Dimanĉo: **Vizito de Bratislava** – ĉefurbo de Slovakio: vizito de Burg-ruino Devín, Bratislava-kastelo, Malnova urbo, libera promeno tra la urbo
Mardo: **Kastelo Smolenice, kaverno Driny**
Ĵaŭdo: **Kastelo Červený Kameň, ceramikaĵ-farado**
Sabato: **Tuttaga ekskurso al Vieno** – Kastelo: „Schloss Schoenbrunn“, Esperanto-muzeo, Malnova urbo, libera promeno tra la urbo

Kaze ke vi ankoraŭ ne mendis la ekskurson, faru laŭeble rapide – post 1a de aŭgusto ni ne garantios liberajn lokojn. Vi povas mendi rete al: peter.balaz@ikso.net